# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 6 N° 2 FEBR. 1986

A T E N T I N D A Ĵ O J

1 03 1986 : kunsido de la Komisiono pri Propagando

15 03 1986 : ekde 10.00 h. : estrarkun-ido de FEL

ekde 13.30 h. : ĝenerala jarkunsido de FEL, al kiu ĉiu estas kore invitata.

Komuniko :

La Ministerio disponigis al ni broŝuron kun 400 adresoj en Flandrio kie eblas pruntepreni diaseriojn, filmojn kaj videobendojn.

La broŝuro nomiĝas : "WERKEN MET AUDIO-VISUELE MIDDELEN" kaj troviĝas en la biblioteko de FEL.

INFORMILO, KADROGAZETO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
FRANKRIJKLEI 140, 2000 ANTWERPEN
TELEFONO : 03/234 34 00
JARABONO : BF 150,- KONTOJ : 402/5510531-55 KAJ 000-0265338-43

---

ESTRARO kaj LABORGRUPOJ

1. KUNORDIGADO : Ivo DURWAEL (prezidanto 03/440 30 92
Paul Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM

Jan BOVENDEERD (sekretario)
Speeltuinlaan 14, 2510 MORTSEL

2. FINANCOJ K. ADMINISTRADO (+ turismo + "taksi stop" + eldonoj)
Erik D'HONDT (estrarano) 053/77 44 97
Wilgstraat 25A, 9440 EREMBODEGEM

Paul PEERAERTS (direktoro) 03/234 34 00
Baron Dhanislaan 13, 2000 ANTWERPEN
Christian DECLERCK (kom. pri literaturo/eldonoj)
Amerikalei 135/2, 2000 ANTWERPEN

3. INFORMADO Edward SYMOENS (estrarano) 03/666 62 66
GAZETARA SERVO Putsesteenweg 131 A, 2180 KALMTHOUT

Herman DECEUNINCK (kom. gazetara servo) 02/360 17 22
Villalaan 1 b.4, 1500 HALLE

Wim DE SMET (kom. sciencoj) 03/666 99 49
Hertendreef 12, 2180 KALMTHOUT

4. INSTRUADO - PROPAGANDO - EKSPOZICIOJ - KONGRESOJ

Petro DE SMEDT (gvida komisionano) 052/21 26 77
Hemelstraat 44, 0330 DENDERMONDE

Marc VAN DEN BEMPT (komisionano) 016/20 14 53
Duisburgsestraat 12, 3030 LEUVEN-HEVERLEE

Albert CLAESEN (komisionano) 011/33 66 03
Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK

Ray GERARD (komisionano)
Antwerpsesteenweg 24, 2250 BROECHEM

5. GRUPA AGADO Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (estrarano) 053/70 50 11
Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS (prelegvojaĝoj) vidu P. Peeraerts

Jules VERSTRAETEN ( OMBUDSMAN) 03/827 66 43
St. Bernardsesteenweg 1078, 2710 HOBOKEN



PROTOKOLO

pri la estrarkunsido de FEL je 1986 02 08 en Esperantodomo Antverpeno.

---

Ĉeestas : Erik D'HONDT (ED), Ivo DURWAEL (ID), Ray GERARD (RG), Paul PEERAERTS (P
Rosette VAN HERCK (RVH), Gerd JACQUES (GJ), Jules VERSTRAETEN (JV)
kaj Jan BOVENDEERD (JB).
Prezidas : ID
Protokolas : JB
Komenca horo : 10.00 h.

------

1. INSTITUCIO HODLER

La kontrakto kaj kontraŭproponoj de Inst. HODLER estas longe pridiskutataj kun la sekvo ke FEK kaj LA VERDA STELO restas sur sia posteno. JV repriparolos la aferon kun la respondeculoj de Inst. HODLER kaj raportos al ni pri la rezulto.

2. "THEATER HUMORFESTIVAL" (Daniël Campaert)

Ĉi teatro okazos - por la dua fojo jam - en la Kultura Centro de Wilrijk je 1986 03 06-15.

Pro lingvaj malfacilaĵoj, la organizantoj petis helpon de FEL por solvi la komunikad-problemojn pere de Esperanto.

Nia helpo povus konsisti el organizado de rapidkursoj k.s. kaj el tradukado de leteroj ktp.

La publikaĵoj estos en la Nederlanda, Franca, Germana, Angla kaj Esperanto.

La organizantoj invitos Esperantisto(j)n al kunsidoj pri preparado kaj al traduklaboroj.

3. VL.ANDERS

JB trovis artikolon pri " ALIA MONDBORSO" je la ekzemplo de "Flanders Technology" en iu revuo pri kiu li tamen ne notis la nomon.

La borso estas planata en decembro 1986.

JB skribos al la respondeculoj de la organizo por peti pli da informoj rilate al eventuala partopreno.

4. " LA KONKORDO - KORTRIJK " 60-jara

La estraro proponas ĉi jare ne honorigi individuon, sed la grupon el Kortrijk pro ĝia 60-jara jubileo.
Aprobite.

5. Ĝenerala jarkunsido.

Proponiĝas okazigi ĝin laŭ la sama skemo kiel pasintjare.

## 6. KONGRESOJ

Al nia letero al la Nederlanda Kupolorganizo "FEN", rilate al niaj kongresoj, ne venis respondo. Nia propono estis, por ne interkonkurenci, alterne organizi kongreson ĉiun duan jaron, jen Nederlanda (1987), jen Flandra (1988) kaj tiel plu kaj reciproke inviti siajn gemembrojn al ambaŭ.

Ni jam scias ke la unuevenonta Nederlanda Kongreso okazos je 1987 04 04-05 en Amersfoort. La diskonigado kaj invitado povus okazi pere de la flavaj paĝoj de ESPERANTO PANORAMA.

JB estas petata sendi memorigan leteron kun kopio al S-ro BOSSONG el Eindhoven.

## 7. FINANCOJ (ED kaj PP)

7.1. La rezultato estas bona, t.e. la jaro 1985, kiel 1984, finis kun profita saldo. Tamen ni perdis 11 membrojn malgraŭ la sukcesa "TEST 5000."

ID sin demandas ĉu ni devos readapti la kotizojn.

Jam pro la fakto, ke ni ĵus readaptis la kotizojn, proponiĝas nun nenion ŝanĝi kaj atendi almenaŭ la rezultaton de la kuranta jaro.

7.2. Kursoj : kontentigaj.

7.3. Eldonejo STAFETO

FEL transprenis la eldonejon STAFETO kaj daŭrigos la eldonadon sub la sama nomo.

La unua libro eldonota estas : " Ĉu rakonti novele " de Johan Valano.

Ekzistis internacia libro-rondo de Stafeto 100-persona. Ties membroj antaŭ-deponis po F. 1.000,- kaj aĉetis ĉiujn librojn eldonitajn de STAFETO. Al ĉikulero dissendita al tiuj rondanoj respondis jam kelkaj favore.

7.4. DEPONOJ.

La prezidanto opinias ke ni denove kaj pli regule propagandu nian deponkonton kaj instigu al partopreno en ĝi.

Tio unue okazos en la venonta ESPERANTO PANORAMA.

7.5. PRISMA VORTARO

Finfine la vortaro pretiĝas. " 't Spectrum" ĝin promesis por venonta aprilo. Tamen kun plia kondiĉo : prez-pliatigo.

Tiu ĉi prez-plialtigo kompreneble metas nin en embarason, ĉar ja sufiĉe granda kvanto da homoj jam antaŭmendis kaj pagis.

Plia intertraktado kun la eldonisto rezultiĝis en tio, ke la jam pagitaj vortaroj estos liveritaj je la antaŭe fiksita prezo, dum la estontaj kostos la novan prezon, nome BF 395,- anst. 295,-.

Dato: 1986 02 20

Kara amiko, kara amikino,

Kun iom da nostalgio mi pensas pri la tempo, eble antaŭ 20 jaroj, kiam ni dediĉis preskaŭ tutan kunsidon de BEF al diskuto, ĉu jes aŭ ne donaci 10 000 frankojn al SUK.
La bilanco de FEL de 1985 montras ciferon de pli ol 4 milionoj. Jam en januaro la estraro decidis pri novaj investoj en libroj kaj vortaroj per duona miliono da frankoj. Ni relative facile faris tiun decidon, ĉar ni estas certaj, ke tiuj investoj havigos iam profiton. Sekvos ankoraŭ pli tiklaj decidoj.
Pro la fakto, ke ni devas manipuli tiom grandajn sumojn, ni povas ankaŭ grave erari. Ĉar pli da opinioj donas pli grandan garantion, mi alvokas vin pripensi, ĉu vi aŭ alia grupano povus eniri la FEL-estraron. Mi esperas je kelkaj kandidatiĝoj antaŭ la ĝenerala jarkunsido je la 15a de marto.
Kiom da tempo postulas estraraneco? Eblas - kiel ekzemple Edward Symoens - ĉeesti nur kelkajn estrarkunsidojn en la jaro por priparoli planojn kaj raporti pri atingaĵoj, cetere memstare labori kaj plenumi tre utilan taskon. La estraro nuntempe kunsidas unufoje monate dum tuta aŭ duona sabato, laŭ la neceso. La tempon, kiun vi rezervu ekster la kunsidoj dependas de via propra iniciatemo.
Do, laŭ siaj eblecoj, estrarano mem povas difini, kiom da tempo ŝi aŭ li dediĉu al FEL. Ĉiuokaze ni jes atendas, ke kandidato havu klaran ideon pri la celoj, kiujn la FEL-estraro devus plenumi.

Plej amikajn salutojn,

Ivo Durwael, prezidanto.

Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
☎ (03) 234.34.00

Kantooruren
Oficaj horoj
9-12.30–13.30-17 h.

Postrekening
Ĝirkonto
000-0265338-43

Bankrekening
Bankkonto
402-5510531-55

BTW
AVI
419.028.122

8. El Budapeŝto venis invito al Konferenco pri Turismo je 1986 03 14 - 18.
La vojaĝo tien eblos pere de ESPERANTOTUR (Leo Debruyne)

9. S-ro Van Dooren petis surkasedigon de "JAHTO VETURAS FOR ...".
Tio ŝajnas al ni laboro por specialistoj.

10. PROPAGANDO. La prezidanto emfazas ke la protokolo pri la kunsido de la tiurilata komisiono ne entenas konkretan proponon rilate al tuj-estontaj ekspozicioj : Naturborso, Antverpeno kaj Lingvoborso, Bruselo. La komisio denove kunsidos la 1-an de marto, do tro malfrue.
ID kaj JB esperas renkonti la komisionanojn en Leuven okaze de SIA por priparoli preparebIojn.
La Naturborso okazos je 1986 03 08 - 16. La Lingvoborso je 1986 03 15 - 16.
Rilate al la Lingvaborso, ES eksciiĝis ke Emil Van Damme pagis la kotizon el propra poŝo. ES petas intervenon en tiu sumo ( BF 5000,-).
Ĉar tiu ekspozicio okazos nome de ILEI, FEL cedos 50 %-n kaj kreditos la konton de E. Van Damme de tiu sumo.

11. PROPAGAND-KAMPANJO (profesia)
Je peto de la komisiono, ID kontaktiĝis kun du pliaj firmaoj. Li transdonos ties proponojn al la komisiono por la venonta kunsido.

12. SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - Leuven
FEL disponos pri 2 horoj en la tagprogramo antaŭtagmeza.
ID proponas uzi ilin pro pritrakti :
- Manlibro de la aktivulo
- Instruista ekzameno
- Propraganda kampanjo.

13. DIVERSAĴOJ

ED raportas ke la Poŝtaj Servoj disponigas, se estas intereso, diapozitivon de la poŝtmarko pri Esperanto de la UK en Antverpeno en 1982.
Tiu diapozitivo estas havebla por BF 4000,- se mendita ĉi jare, por BF 2000,- se ventontjare. Poste ĝi estos detruita.

Decidiĝas atendi ĝis venonta jaro kaj mendi ĝin tiam.

Fino de la kunsido : 16.40 h.

JB.


-----------------

## A N A L I Z O D E R I L A T O J

En la fakliteraturo oni anstataŭas la titolon per TRANSAKCIA ANALIZO. Transakcio estas fakvorto el la ekonomiko. Temas pri la tutaĵo de la rilatoj inter du komercistoj por alveni - aŭ ne - al negoco.

Simile en la nuna teksto temas pri la rilatoj inter du homoj, kiuj kontentigas aŭ kondukas al konflikto. Sed ŝajnas al mi, ke la titolo "Analizo de Rilatoj" estas pli klara ol "Transakcia Analizo".

En T.A. oni bildigas la tri erojn de la homa menso per tri cirkloj. Por analizi la rilaton inter du personoj, oni uzas jenan bildon :





Ni imagu jenan situacion :

S-ro A :"Oni ne plu vidas junulojn en nia klubo, ĉu ne ? Ili certe timas, ke ili devas fari iun laboron."

S-ro B :"Jes, sed por ricevi stipendion por eksterlanda vojaĝo ili ja venas. Terure, ĉu ne ?"

Tio estas klara Gepatra reago de S-ro A al la Gepatro de S-ro B. S-ro B tuj reagas per Gepatra reago al S-ro A. La reagoj estas paralelaj.




La du homoj kompletigas siajn kritikajn ideojn pri la junularo. Ili povus tiel daŭrigi dum longa tempo sen problemoj. S-ro B fakte donas tian respondon kian S-ro A atendas de li.

Alia ekzemplo de kompletiga reago


A : "Mi ege bedaŭras. S-ino Jansen ne plu venas al nia klubo kaj ŝi



estas valora membrino."

B : "Vi ne devas senti vin kulpa. Vi faris ĉion eblan por repacigi ŝin kun Leo Witters."

Nun la skemo fariĝas :




S-ro A petas kvazaŭ moralan helpon kaj S-ro B volonte reagas per sia Zorgema Gepatro.


Kaj ĉu vi povas diveni la rilaton en jena situacio :

1. A : "He, jen vi ! Saluuuuuton !! (kis, kis, kis)
   B : "Ho, mi tiom ĝojas ĉar mi revidas vin."
2. A : "Paul, ĉu vi ankoraŭ havas 100 informajn broŝurojn ?"
   P : "Momenton, mi tuj rigardos."

Ne ĉiam la rilatoj estas kompletigaj.

A : "Clara, ĉu vi scias kie troviĝas mia kongreslibro ?"

B : "Ĝi kuŝas tie, kie vi lasis ĝin !"



Nun la rilato estas krucita. Mi esperas ricevi informon, sed mi ricevas riproĉon de Kritikema Gepatro. Tia neatendita respondo verŝajne kaŭzas frustacion, koleron aŭ konsterniĝon. Tiaj krucitaj reagoj povas esti la komenciĝo de malpaco !

Provu foje imagi la skemon per jenaj ekzemploj :

3. A : "Mi taksas, ke mi ne sukcesos finredakti la revuon hodiaŭ !"
   B : "Kial vi do atendas ĝis la lasta minuto por komenci tiun taskon ?"
4. A : "Do, la revuo pretiĝos nur postmorgaŭ ?"
   B : "Vi ne povas atendi ke mi laboru ankoraŭ pli rapide ! Miaj fingroj nun jam doloras pro tiom da faldlaboro. Vi ne scias, kiom peza

estas tiu tasko

La krucitaj rilatoj ĝenerale vundas homojn, kaŭzas frostiĝojn kaj malakcelas aktivecojn.

Sed plej malfacilaj estas la kaŝintencaj rilatoj. Ekz. A : "Mi malsaniĝas pro tiu laboro." Unuavice tio povas ŝajni informo, sed fakte ĝi estas helpopeto. (Do, ŝajne P —— P, sed kaŝe I —— G)

La direktoro kiu rigardas sian horloĝon kun malafabla mieno kaj samtempe diras : "Mi ĝojas ke vi alvenas, ĉar mi urĝe bezonas vin ", certe ne ĝojas. Do laŭvorte ĝi estas I —— G, sed laŭintence G —— I.

La vendoteknikoj estas plenaj je ŝajne objektivaj komunikoj kun kaŝintencoj. Ni pensas precipe pri reklamoj en kiu kuracisto, teknikisto ... specialisto donas konsilojn.

Mi donis kelkajn simplajn ekzemplojn, sed en la realo oni devus prijuĝi la tutaĵon de ĉiu situacio: la kuntekston, la gestojn, la manierojn ktp. por prijuĝi la sincerecon de la rilatoj. Tia analizo estas tre instrua okupo, kiam multaj homoj sidas kune, ekz. en klubkunveno. Indas foje elprovi tion !


Solvoj de la demandoj :

1.

2.

3.

4.




I.D.